

BULTENO

de GERMANA ESPERANTA FERVOJISTA ASOCIO

Mitteilungsblatt der Vereinigung deutscher
Eisenbahner-Esperantisten im Bundesbahn-Sozialwerk



Fondita 1952


Numero 2

aprilo/majo/junio 1988



32a GEFA-Jarkunveno en Kaiserslautern

7a ĝis 9a de oktobro 1988



Wochenmarkt auf dem Stiftsplatz mit Stiftskirche aus dem 13. Jahrhundert.

Nia venonta jarkunveno

Kiel ĉiujare la germanaj esperantistaj fervojistoj invitas kore al sia aŭtuna jarkunveno. Gastiganta urbo inter la 7a kaj 9a de oktobro 1988 estos Kaiserslautern en la sudokcidento de nia lando. Alloga programo kredeble kontentigos la membrojn de GEFA kaj iliajn familianojn. Oni atendas volonte gastojn el eksterlando.

La jarkunvenoj de la Germana Esperanta Fervojista Asocio (GEFA) havas tradicion jam depost pli ol 30 jaroj. Tio ne signifas, ke ili disvolviĝas ĉiam laŭ la sama skemo. Ĉiujare ni renkontiĝas en alia urbo, kio estas rimarkinda avantaĝo. Sed ankaŭ la programo ĉiujare varias. Pro tio ni partoprenas volonte tiujn kunvenojn, kiuj altiras regule ankaŭ geamikojn el aliaj landoj.

Kaiserslautern situas en la sudokcidenta parto de nia lando. Ĝi estas favore ligita kun la fervoja reto, ekzemple per linioj al Mannheim, Saarbrücken aŭ Köln. La urbo nombras intertempe pli ol 100 000 loĝantojn, multnombrajn kulturinstituciojn, lernejojn, eĉ universitatojn. Inter sportamantoj precipe la tiea futbalklubo ĝuas respektindan renomon.

Pri la setligo jam antaŭ 3000 jaroj ekzistas spuroj. Pli evidenta estas la restaĵoj el la romia periodo (2a ĝis 5a jarcento p.K.). En la 7a jarcento fondiĝis la reĝa korto „Lutra“. 200 jarojn poste, en 822, la nomo Kaiserslautern estas unuafoje dokumentita. La imperiestro Frederiko la Unua (Barbarossa) konstruigis tie palatinan palacon samkiel en aliaj lokoj de nia lando, ĉar siatempe la imperiestroj havis diversajn rezidejojn. En la 16a jarcento sekvis la konstruado de la t.n. palatina grafa kastelo. Tio ĉio ne plu ekzistas, ĉar la loko, kiu ricevis urbajn privilegiojn en 1276, ofte suferis pro ruinigaj invadoj el eksterlando.

Post la lasta mondmilito akompanita de gravaj damaĝoj Kaiserlautern transformiĝis en modernan grandurbon. Oni fieras pri la plej alta urbodomego en nia lando. Bonŝance konserviĝis tra la ŝtormoj de la jarcentoj profanaj kaj sakralaj konstruaĵoj, inter ili vizitindaj preĝejoj en gotika stilo, faktrabaj domoj kaj nobelaj palacoj. En la 19a jarcento oni starigis en renesanca stilo la t.n.

fruktohalon kaj la palatinan galerion, kiu lasta entenas artajn kolektaĵojn.

En la urba centro atendas la kongresanojn la Kolping-domo. Eble vi rememoras, ke dum antaŭaj kunvenoj samnomaj domoj kelkfoje estis je nia dispono. La preciza adreso estas „Neue Eintracht-Kolping-Haus, A.-Kolpingplatz 11“. Kiu alvenos ĝis vendredo posttagmeze, estas invitata partopreni la akcepton en la urbodomo. Inter stacidomo kaj urbodomo cirkulas aŭtobusoj. Vespere oni renkontiĝas en la kongresejo, bonvena okazo por revidi geamikojn kaj babili sen fiksa programo. Sabaton antaŭtagmeze okazos komuna rondirado tra la vidindaĵoj de la urbocentro, dum la oficialuloj kaj kandidatoj de lingvaj ekzamenoj restos en la kongresejo por labori.

Post kumuna tagmanĝo la aŭtobusoj startas al la najbara urbo Homburg (Saar), pli precize al la tiea subĉiela romia muzeo. Ĝi prezentas restaĵojn kaj rekonstruitajn partojn de iama kelto-romia kamparurbo de sufiĉe granda amplekso. Pro tio, ke post ĝia detruo en la tria jarcento la tereno fariĝis kamparo, la arkeologiaj akiraĵoj estas aparte valoraj kaj abundaj. Kiel kutime kafopaŭzo interrompas la ekskurson. La reveturado kondukas tra la aŭtuna palatina arbaro.

Por la festvespero oni atendas honorajn gastojn el la publika, fervoja kaj sindikata vivo, sed ne malpli gekolegojn el eksterlandaj asocioj. La solenaĵon enkadrigas muzikaj kaj kantaj kontribuaj. Dance-muloj ne devas atendi tro longe. Ilin stimulos orkestro de la Socialorganizaĵo. Dum la tradicia dimanĉa matineo la GEFA-prezidanto raportos pri la laboroj de la pasinta jaro kaj la atendota perspektivo. Sekvos ankaŭ kulturaj prezentaĵoj detale ankoraŭ ne fiksita, sed certe promesplenaj. Lastan fojon la kongresanoj kolektiĝas por la komuna tagmanĝo, antaŭ ol ili revojaĝos al siaj hejmaj lokoj.

GEFA forte esperas, ke eble plej multaj amikoj de la internacia lingvo sekvos tiun inviton, por ke la jarkunveno 1988 fariĝu sukcesplena. La respondeculoj multe klopodas por agrablighi vian restadon. Sendu baldaŭ vian aliĝilon al la anoncita adreso. Ĝis revido aŭtune en Kaiserslautern!

W.B.

Aliĝilon vi ricevas kun tiu ĉi Bulteno. Vil povas mendi plian aliĝilon kun provizora programo ĉe:
S-ro Alois Hauptenthal,
Brennender-Berg-Straße 28,
D-6603 Sulzbach/Saar.
Limdato: 31.8.1988

Einladung zum Jahrestreffen 1988

Die Vereinigung deutscher Eisenbahner-Esperantisten im Bundesbahn-Sozialwerk (GEFA) lädt wiederum zu ihrem alljährlichen Herbsttreffen ein. Unsere Jahresversammlung findet vom 7. bis 9. Oktober 1988 in Kaiserslautern (Rheinland-Pfalz) statt, und zwar im Kolpinghaus, Kolpingplatz 11. Dort besteht auch Gelegenheit zum Kauf von Esperanto-Literatur.

Vom attraktiven Programm hier ein Auszug: Am Freitagnachmittag werden die Teilnehmer im Rathaus, übrigens dem zweithöchsten unseres Landes, von der Stadt begrüßt. Der Abend sieht kein festes Programm vor, dafür Gelegenheit zum gemütlichen Zusammensein im Kolping-Haus. Am Samstagvormittag wollen wir gemeinsam die Sehenswürdigkeiten der Stadt bei einem Rundgang kennenlernen. Trotz zahlreicher Zerstörungen in den 1200 Jahren seiner Geschichte haben sich in Kaiserslautern noch manche profane und sakrale Bauten aus alter Zeit erhalten.

Nach dem gemeinsamen Mittagessen folgt ein Busausflug nach Homburg. Dort wurden vor zwei Jahrzehnten die Reste einer keltisch-römischen Landstadt entdeckt und wiederhergestellt. Die ausgedehnten Anlagen zeugen von einem hohen Stand der Wohnkultur. Nach der Kaffeepause führt die Rückfahrt durch den herrlichen Pfälzer Wald. Zum Festabend, der von musikalischen und gesanglichen

Darbietungen umrahmt wird, erwartet man Ehrengäste aus dem öffentlichen Leben sowie Delegierte ausländischer Landesverbände. Auch das Tanzen kommt nicht zu kurz.

Bei der Matinee am Sonntagvormittag gibt der Vorsitzende der Vereinigung einen Überblick über die Geschehnisse des vergangenen Jahres. Ferner werden kulturelle Beiträge geboten. Wie immer besteht an den beiden Tagen Gelegenheit zur Ablegung von Sprachprüfungen. Wer sich für die besonderen Belange der Vereinigung interessiert, kann statt der Stadtführung die Teilnahme an der Arbeitssitzung wählen. Kaiserslautern mit seinen günstigen Zugverbindungen erwartet uns als seine diesjährigen Tagungsgäste. Die Verantwortlichen bemühen sich, unseren Aufenthalt so angenehm wie möglich zu machen. Für viele Mitglieder unserer Vereinigung ist das Herbsttreffen die einzige Gelegenheit im Jahr, die Verbindung mit den Sprachfreunden im In- und Ausland aufrechtzuerhalten. An sie richtet sich vor allem unsere Bitte, sich baldmöglichst anzumelden. Ein Anmeldevordruck ist dieser Ausgabe beigelegt. Weitere Exemplare können beim zuständigen Bezirksbeauftragten für Esperanto angefordert werden.

W. B.

Sprachprüfungen

Wir empfehlen die Teilnahme an einer der Prüfungen, die von der GEFA-Prüfungskommission in Kaiserslautern durchgeführt werden.

Melden Sie sich mit dem beiliegenden Vordruck (aliĝilo) zur Teilnahme an und teilen Sie außerdem Ihre Bereitschaft schriftlich oder fernmündlich mit an: BAR a. D. Lautenbach, Abhoflach „Esperanto-Gruppe 640 Fulda“. Privatanschrift und Rufnummer: Siehe Bulteno 1/88, Seite 8.

Elektrizado:

La Germana Regna Fervojo (DR) en GDR volas funde plibonigi sian relvojaron ĝis 1990. Por tio la kvoto de elektrizitaj trakoj dum la estontaj kvar jaroj devas esti plialtigata de nun 16 % al 60 %. La relvojaroj en la GDR sumiĝas nuntempe je 14.200 km.

El Schöne Welt

IFES en Bavario

La ĉi-jara Internacia Fervojista Esperanto-Skisemajno okazis de la 27a de februaro ĝis la 5a de marto en Spitzingsee en la Bavaraj Alpoj. Ni loĝis en „Willy-Merkel-Haus“, sporthejmo de germana fervojista sportunuigo. Willy Merkel estis fervojisto el Munkeno. Li multe aktivis ĉe la klopodoj starigi tiun domon. Bedaŭrinde li jam frue mortis dum grimpado sur monto Nanga Parbat. La granda verda rubando ĉe la balkono de la „Willy-Merkel-Haus“, indikanta la okazon de la 29a Skisemajno, salutis ne nur la alvenantajn Esperantistojn, ĝi atentigis ankaŭ la aliajn gastojn. Ili montris sin interesitaj kaj reagis entute pozitive por Esperanto.

Ni estis 41 partoprenantoj el 8 landoj: Aŭstrio, Belgio, Danlando, Francio, Germanio, Italio, Pollando kaj Svislando.

Estas ĉiam granda ĝojo, revidi la konatulojn. Oni bedaŭras, ke kelkaj ĉi-jare ne povis ĉeesti. Sed ke Gérard Horn neniam denove estos en nia rondo, malgajigas ĉiujn. Per komuna silento ni honorigis lin.

La vintro 1988 ĝis tiam estis kiel printempo. Sed kiam la skisemajno komenciĝis, jam la verdaj herbejoj estis neĝkovritaj kaj la lago frostita. Krome neĝis dum kelkaj tagoj kaj noktoj tiel multe, ke la neĝtavolo fariĝis tre alta. Pro tio la skiantoj kaj la skimigrantoj estis iomete ĝenitaj, eluzi la multajn eblecojn por sporti. Tamen la plej multaj skiis sur la diversaj skivegoj kaj skimigris.

La programo de la Skisemajno estis multspeca. Fruvespere oni havis la eblecon sin perfektigi en konversacia



29a IFES en Spitzingsee: atendente transporton al la skilifto.

rondo. Pere de Esperanto oni povis informiĝi tuj post la vespermanĝo pri necesaj esprimoj en la franca lingvo, bezonataj dum la vojaĝo al la IFEF-kongreso en Perpignan. Memkompreneble estis sufiĉaj eblecoj por amuziĝi. Tre plezure estis, vidi filmojn kaj diapozitivojn pri iamaj skisemajnoj. En la historia gastejo „WurzHütte“ okazis folkloro vespero. Eblecoj por danci ne mankis. Ĉe karnavala vespero oni admiris la ideriĉan maskiĝadon.

Ne nur dum la lingva konkurso ni devis streĉi la cerbojn, ankaŭ dum la piediranta konkurso. Ĉiu partoprenanto ekmarŝis por si mem. Ekipite per demandfolio kaj skribilo li devis serĉi la ĝustan vojon, ne maltrafante la demanditajn vidindaĵojn.

Dum la diversaj skikonkursoj la suno denove brilis kaj la neĝo estis taŭga. Kunagi estis la ĉefafero.

Kiel kutime je la lasta vespero estis la honorigo de la plej bonaj partoprenintoj de la diversaj konkursoj. La IFEF-premion akiris Erik el Danlando. Per aplaŭdo ĉiuj esprimis la kunĝojon por la gajnantoj.

Kun la transdono de la rubando al la reprezentantino de Pollando, kie okazos la venontjara IFES, finis nia skisemajno. Estis harmonia etoso inter la partoprenantoj de 2 1/2 ĝis 78 jaraĝaj. Feliĉe, ke neniu malsaniĝis. Ke ni ĉiuj trapasis la tagojn en agrabla kaj ĝoja atmosfero estis ne finfine la merito de la organizantoj kaj helpantoj — dankon al ili!

Schr.

El la grupoj

Frankfurt/Main

Esperanto-Kurse

Unter Leitung der BSW-Esperanto-Gruppe Frankfurt begann am 2. Februar 1988 im Konferenzraum Nord, Frankfurt Hbf, ein Sprachkurs.

Begleitmaterial des Kurses ist der von der Vereinigung deutscher Eisenbahner-Esperantisten im BSW herausgegebene Fernkurs mit Basis-Lehrbuch, Begleitbriefen und Tonkassette. Diese Lernmittel ermöglichen auch eine problemlose Weiterführung des Kurses zu Hause,

ideal auch für Kollegen im Wechseldienst. Den Teilnehmern wird dadurch die Möglichkeit geboten, ihre Sprachkenntnisse u. a. schon beim Kongreß des Internationalen Eisenbahner-Esperanto-Verbandes (im Rahmen der FISAIC) in Perpignan/Südfrankreich vom 4. — 10. Juni 1988 anwenden zu können.

Ebenfalls begann ein Sprachkurs der Esperanto-Gesellschaft Frankfurt im Bürgerhaus Gallus Frankfurt/M.

Im Wintersemester 87/88 steht wieder Esperanto auf dem Lehrprogramm der Uni Frankfurt. Die Lehrbeauftragte, Frau Dr. Alicja Sakaguchi, behandelt in einem Seminar „Zeichentheoretische Aspekte der Welthilfssprachen“. Gleichzeitig vermittelt die Dozentin, die in Budapest für Esperanto promovierte, Sprachkenntnisse in Esperanto.

Fernkurs

— leichter geht's mit Esperanto —

Hände und Füße taugen nicht zum Sprechen, besser: reden wie der Schnabel gewachsen ist, überall Kontakte finden, für Jugendliche kostenlose Übernachtung in vielen Ländern. Kein Problem, denn es gibt ja

— Esperanto — die internationale Sprache

Starten Sie sofort bequem daheim mit unserem **Fernlehrgang**, bestellen bei Joachim Schrapp, Schmittingheide 17 d, 4400 Münster (Westf.), dort auch Information. Preis für 7 Lehrbriefe, Tonkassette, Betreuung durch Experten. DM 30,—, bitte vorher überweisen auf Koto 61150-466, Postgiroamt Dortmund (Schrapp, Münster).

Die Medien entdecken Esperanto

Das 100 jährige Jubiläum der Internationalen Sprache findet in den Medien der Bundesrepublik große Beachtung. Fernsehen, Radio und Presse berichten in vielfältiger Form über Geschichte und Zukunft des Esperanto. Zwar taucht immer wieder Skepsis im Hinblick auf die Durchsetzbarkeit auf, aber es überwiegt eindeutig die positive Haltung gegenüber der „Idee Esperanto“, die als seriöse

Alternative zur herkömmlichen Sprachpolitik diskutiert wird. Allein in den BSW-Mitteilungen des Bezirks Frankfurt erschienen 22 Berichte im Jahr 1988.

Bisheriger Höhepunkt war zweifellos das einstündige „Streitgespräch“ im 3. Fernsehprogramm der „Nordkette“, in dem Prof. Dr. Helmar Frank souverän die Einwände des WELT-Journalisten Enno von Loewenstern zurückweisen konnte. Junge Esperanto-Freunde stellten ihre Sprache im Jugendmagazin „Kaputsching“ im 1. Fernsehprogramm vor und Wolfgang Schwanzer (Esperanto-Gesellschaft Frankfurt) wurde in seiner Eigenschaft als stellvertretender Vorsitzender des DEB in der „Tele-Illustrierten“ (ZDF) und im „3 SAT-Studio“ (3SAT) interviewt.

In mehreren Nachrichtensendungen wurde über den Jubiläumskongreß in Warschau berichtet.

Im Rundfunk gab es zahlreiche Interviews und Reportagen über Esperanto, an denen auch Mitglieder der BSW-Esperantogruppen unseres Bezirks beteiligt waren. Die wohl beste Sendung lief in SDR II: „Statt 1000 Zungen eine: Esperanto - eine Weltsprache wird 100 Jahre alt“. Diese Sendung wurde im Herbst im Hessischen Rundfunk ausgestrahlt.

Geradezu überwältigend war die Berichterstattung in der Presse. Kaum eine der großen Tageszeitungen ließ das Thema aus. Die Frankfurter Zeitungen berichteten ebenso wie die Offenbach Post und das Darmstädter Echo, wie die WELT die ZEIT, die Süddeutsche, TIME usw. Auch Zeitschriften wie Bild der Wissenschaft setzten sich mit Esperanto auseinander.

Esperanto ist ins Gespräch gekommen, die „Idee hat Lebenskraft bewiesen“, wie es Bundespräsident Richard von Weizsäcker formulierte.

Kiefer

Philatelie

Unter der Rubrik „Thematik stellt sich vor“ erschien in der Fachzeitschrift „Die Briefmarke“ (März 1988) eine

umfassende Darstellung über Esperanto in der Philatelie.
Verfasser: Friedrich Mager, GEFA-Mitglied und Mitglied der BSW-Esperanto-Gruppe Frankfurt/M. aus Bad Schwalbach.
Auf sechs Seiten wird die Geschichte und der heutige Stand des Esperanto, und seine Organisationen einschließlich IFEF und seiner Kongresse geschildert.
46 Abbildungen von Esperanto-Briefmarken, Sonderstempeln und Ganzsachen bereichern diesen wertvollen Beitrag.
Die Veröffentlichung verdient besonderer Beachtung. W.B.

Bremen

La 10an de februaro la grupo kunvenis por celebri la jarkunvenon, beaŭrinde nur 13 membroj partoprenis.
3 grupanoj partoprenis la 13an de februaro la renkontiĝon en Groningen/Niederlando.

Merkredon, la 9an de marto prelegis sinjoro Günther Peek pri rondvojaĝo tra Pollando kaj montris diapositivojn.
La 13an de aprilo prelegis s-ro Friedrich Coburger pri:

La UEA-kongreso en Varsovio, la vizito de zamenhofaj lokoj kaj impresoj pri Pollando.

La 7an de majo okazos la maja ekskurso.

Dortmund

Im Institut für Weiterbildung der Rheinisch-Westfälischen Auslandsgesellschaft e.V. in Dortmund führte der Esperanto-Kreis unter Leitung von Wolfgang Loose folgende Veranstaltungen durch:

11. 1. Diavortrag „Nördliches Frankreich“ - Eduard Weichmann,
23. 4. Tut-Anĥ-Amun: La egipta trezoro el eburo kaj oro, jam la 19an de decembro raportis Radio Dortmund / 4. programo pri la Zamenhoffesto.
Partoprenis 35 GEFA-anoj.

Neu erschienen:

Suplemento al Plena Ilustrita Vortaro (45 Seiten) mit vielen neuen Wörtern (mehr oder weniger notwendigen), darunter 35 Eisenbahnerfachausrücke, die Gernot Ritterspach vorgeschlagen hat. Fragen Sie bei Ihrem Bücherdienst nach!

Köln

Der Bezirk Köln lädt alle Mitglieder mit Familienangehörigen und Freunden für Samstag, 7. 5. zu einer Frühlingswanderung ins Siebengebirge ein. Ziel ist die Löwenburg im Siebengebirge. Anmeldungen nimmt der Bba Köln, E. Herlitze, gerne entgegen.

Als neue Mitglieder begrüßen wir: Wilhelm Friesdorf, tBAmtn a.D., Roermonderstraße 204, Aachen und Eduard Weichmann aus Dortmund, den unser Mitglied Hanna Schindler beim Zamenhoffest in Dortmund geworben hat. Wir freuen uns über den Zuwachs in unseren Reihen.

Nekrologo

La 25an de januaro forlasis nin

Kurt Müller (78)

el la distrikto Nürnberg. Li estis fidela membro de GEFA multajn jarojn.

Ni profunde bedaŭras lian forpason kaj kondolencas sincere al lia parenkaro.

Mitteilungen

Für den IFEF-Kongreß 1988 sind bisher 500 Anmeldungen (Stand: 1. 2. 88) in Perpignan eingegangen und bearbeitet worden. Falls Sie sich noch nicht angemeldet haben und teilnehmen wollen erledigen Sie das umgehend, da die Unterkünfte in Perpignan 2 Monate vor dem Kongreß bestellt werden müssen.

Die nächste Internationale Eisenbahner-Esperanto-Skiwoche findet vom 18. - 25. 2. 1989 in den Beskiden / Polen statt. Weitere Informationen folgen im Laufe dieses Jahres.

Die nächste JV wird vom 6. - 8. 10. 1989 in Verden / Aller, Bezirk Hannover, vorbereitet.

32a JV Kaiserlautern

**Aliĝilo / Anmeldung -
hotelaj prezoj / Hotelpreise**

Das Angebot wird erweitert

Zimmer mit Fließwasser

EZ bis 25,-, DZ bis 60,- DM

Zimmer mit Bad oder Dusche

EZ bis 35,-, DZ bis 74,- DM

Zimmer mit Bad / Dusche und WC

EZ bis 40,-, DZ bis 100,- DM

Wir bitten, Ihre Wünsche entsprechend kenntlich zu machen.

El la fervoja mondo

Granda Britio:

La interurba trafiko de la Britaj Fervojoj (BR) fariĝu pli alloga. Kiel unua etapo en tiu plano necesas kreado de malgranda Pullman-reto, kiu antaŭ ĉio estu je dispono por komercaj vojaĝistoj. Tiuj Pullman-trajnoj trafikos kvinfoje ĉiutage inter Londono kaj Manchester, dufoje inter Londono kaj Liverpool kaj unufoje inter Londono kaj Leeds. Ankaŭ la ordinarnaj trajnoj sur tiu IC-reto ricevu novan aspekton. La bezonataj vagonoj estas nuntempe modernigataj.

Belgio:

En unuhora kadenco de Bruselo al Oostende.

Sur la 110 km longa lineo de Denderleeuw al Brugge tra Zotteghem kaj Kortrijk la elektra traktio ekfunkciis. Per tio fariĝis ebla IC-trafiko en unuhora kadenco de Bruselo al Kortrijk kaj de Kortrijk kaj Oostende, kio sur la 156 km longa linio rezultigis redukton de la veturdaŭro je 32 minutoj.

Kanado:

Radiofonia sistemo en trajna

Sur 306 trakkilometroj en Quebec (Kvebeko) kaj en Vermont la kanada CP-Rail instalas tre modernan radiofonian sistemon kiu funkcias helpe de antenoturoj starigitaj en distanco de proksimume 32 km. Ĝi ebligas interparolon de la deforestro kun trajnpersonaro kaj traktlaboristoj disponantaj pri riceviloj moveblaj respektive portebaj.

Maroko:

Transversa linio planita

La marokaj fervojoj (ONCFM) planas konstrui en la suda parto de la lando transversan linion de Tarudant al Bou Arfa, por alligi la jam konstruitan linion Marakeŝ – Agadir – Laayoune al la orienta parto de la fervoja reto, ĉirkaŭirante la atlas-montaron. Krome oni plilongigos la linion Marakeŝ – Laayoune – ĝis Dakhla kaj Lagwira por tiel realigi interligon kun la fervojoj de Maŭretanio kaj de Senegalo kaj eventuale kun la fervojaj retoj de la Saharo. Tiu ĉi ambicia projekto estas grava ero de la planita kontinenta ligo inter Eŭropo kaj Afriko trans la markolo de Ĝibraltaro, kiu nuntempe ankaŭ ree estas diskutata.

Re

Hispanio:

Alloga proksim-trafiko

Kiel alloga oferto en la pasaĝera proksim-trafiko la Hispanaj ŝtatfervojoj (RENFE) prezentis antaŭ nelonge en Madrido novajn dizelajn motorvagonojn por mallongaj distancoj. Ili formas motortrajnojn konsistantajn el po 3 interaj vagonoj kaj po 2 motorvagonojn ĉe ambaŭ finaĵoj, entute kun 228 sidlokoj. Ĉiuj vagonoj estas aer-risortitaj, havas aŭtomatajn pordojn, klimatizinstalaĵon kaj ŝanĝeblajn fotolojn. La plej alta rapideco de la trajnoj, de kiuj jam 70 unuoj estas menditaj, estas 120 km/h. RENFE atendas la liveron de tri tiaj dizelaj motortrajnoj monate.

Re

USONO:

Per IC de Pittsburg al Philadelphia

Inter Pittsburg kaj Philadelphia estonte trafiku superrapidaj IC-trajnoj. Ĉi-rilata studaĵo kun tri variantoj estis prezentata de la Pensilvaniaj Fervojoj. Ĝi konsideras trafikreskon sur tiu linio al dekdu milionoj da vojaĝantoj jare ĝis la jaro 2000. La projekto baziĝas sur la funkciigo de 200 km/h rapidaj britaj High Speed Trains (HST) kaj veturdaŭro por la 565 km longa linio de preskaŭ kvar horoj je kosto de 1,8 miliardoj da US-dolaroj. Rektigon de la linio kaj partan novkonstruon ĝis ankoraŭ nur 505 km proponas alia plano laŭ kiu francaj TGV aŭ japanaj Shinkansen-trajnoj povus trafiki ĉe

veturdaŭro de eĉ nur tri horoj, je kosto de 7,2 miliardoj da US-Dolaroj.

Fritz Busse

Aktuala kanto

Sur la ŝvabaj fervojoj preskaŭ ne plu haltas trajnoj, ĉe stacio Durllesbah eĉ ne haltas trajnoj. – Aĥ!

Volas havi vi bileton kaj vi trovas ne ĝiceton. aŭtomato donas ĝin eĉ al Ulm laŭ la destin'.

Homoj! Rekomendo estu, ke la aŭto hejme restu. Uzu la fervojon vi, por ke ne pereu ĝi.

K. Bernhard

Esperanto an erster Stelle Täglich drei Stunden Esperanto aus Warschau

Zum ersten Mal in der 100-jährigen Geschichte der internationalen Sprache Esperanto erlangte im Jahr 1985 eine Esperanto-Redaktion die größte Zuhörerschaft eines Rundfunksenders. Fast ein Viertel aller Zuschriften, die aus aller Welt bei Radio Polonia eingingen, stammten von Esperanto-Hörern. Zu diesen Hörern gehören auch Mitglieder des BSW-Esperanto-Klubs, Bezirk Frankfurt, die schon viele Jahre den Kontakt zu Radio Polonia pflegen.

Insgesamt strahlt der polnische Auslandsdienst Programme in zwölf Sprachen auf Kurz- und Mittelwelle aus. Seit dem 44. Esperanto-Weltkongreß 1959 in Warschau sendet er auch in Esperanto. Wurde zunächst nur ein halbstündiges Programm täglich ausgestrahlt, so waren es 1968 schon drei. Der Aufschwung begann vor vier Jahren. Aufgrund vermehrter Hörerzuschriften erhöhte Radio Polonia 1982 die Zahl der Sendungen auf fünf pro Tag. Seit dem Juli 1983 heißt es sogar sechsmal täglich: „Parolas Varsovio, la naskiĝurbo de Esperanto.“ (Hier spricht Warschau, die Geburtsstadt des Esperanto.“

Redaktfino por n-ro 3/88 estas la 5.7.1988

Herausgeber / eldonanto: Hauptvorstand des Bundesbahn-Sozialwerks, Frankfurt (Main). Schriftleitung / redakcio: Wilhelm Graß, 8620 Lichtenfels, Sachsenstr. 7, Druck / presloko: Druckerei Friedrichs, 3420 Herzberg am Harz